# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 7 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 7

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

## Postmorta mondo — ĉu?

Oni ĉiam aŭdas en religiaj rondoj la frazon: "Ĉiuj estas egalaj antaŭ dio"; tamen tio ne malhelpis subteni ĉiuspecajn distingojn sur la tero. La sklavo kaj la sklavtenanto eble estas egalaj antaŭ la okuloj de dio; sed tio ne malhelpis al la sklavtenanto havi la rajton "bastonadi sian propran nigrulon", kvankam egalaj antaŭ la okuloj de dio, ili ne estas egalaj en la ceremonio de enterigo, nek en la speco de ĉerko, en kiuj ili ripozas. Kaj, kompreneble, ili ne estas egalaj en la estonta mondo. Por distingi ilin, ekzistas paradizo kaj infero. "Egaleco en la morto", "ĉiuj homoj estas fratoj", "la laboristo meritas rekompencon" ktp.. estas nur kelke da laŭtaj frazoj, per kiuj la eklezio stultigas la kategorion de homoj, kiuj ŝatas sonon pli ol sencon.

Kompreneble, ni pensas, ke neegaleco post la morto ne estas pli abomena ol neegaleco en ĉi tiu vivo. La individuista kristano bildigas la estontan vivon kiel lokon, kie socialismo estas malpermesata. La socialista kristano imagas ĝin esti loko, kie klasdistingoj ne estas konataj. Unu estonta mondo taŭgas al la Kajzero, alia al Ramsi Makdonald. En la alia mondo la lumkrono estos, certe, pli gracie portata, ni diru, de Caro Nikolao rekte de la trono, ol de mizera karbministo. La kantistino Melba, sendube, estos pli dezirata por kanti en la ĉiela ĥoro ol Roza Luksemburg. Kortegano pli gracie flirtos antaŭ la ĉiela trono ol Lenin. Tie tuta aro da homoj superos unu la alian pro iuj kvalitoj. Se estas postmorta vivo, kaj tiuj, kiuj venos tien, estas la samaj homoj, kiuj estas ĉi tie, ili nature havos kun si siajn personajn kaj klasajn distingojn. Sed, se ni poste ne estas la samaj homoj kiel ĉi tie, tiam tiuj tute ne estas NI. Kaj kio okazos al ili, ne rilatas al ni. Tie maskludos nur spiritaj friponoj sub nia nomo.

Ni ne vidas ian avantaĝon vivi eterne. Estas malĝojiĝe pensi, ke oni devas eterne vivi. La perspektivo eterne kanti laŭdojn al egoista dio, rakontante al li, ke li estas granda kaj glora, tio — aĝon post aĝo — estas bildo tute ne ĉarmiga. Ankaŭ ni tute ne ŝatus resti eterne kun homoj, kies sola merito por esti en tiu glora loko, estas, ke ili atingis la idealon esti nomataj bonaj kristanoj. La lastaj tute ne pensas, ĉu tio estas komforta por aliaj. Ni ne volas eterne vivi, — ni ne povas imagi kvin aŭ ses milojn da jaroj da iu ajn ekzisto, kiu ne fariĝus monotona, kaj ni protestas tiel longe vivi kune kun multaj homoj, kiujn ni konas en nuna mondo. Estas homoj, kun kiuj ni ne tolerus vivi eĉ unu semajnon. Ili dolorigus niajn nervojn, kaj se al la anĝeloj ne estus permesote senĉese fiparoli kontraŭ ili, la ĉirkaŭflugado kun iuj homoj fariĝus enuiga kaj abomena. Imagu ĉielon, en kiu s-ro Kuk (Cook) devus ludi harpon kune kun s-ro Brian (Briand), kie Hindenburg devus froti sian lumkronon kun Trocki, aŭ kie la Papo de Romo devus frapeti siajn flugilojn kun tiuj de la redaktoro de "Liberpensulo". Iu ajn el tiuj spiritoj certe preferus ekskursi al la infero kaj ne reveni. Ni konsentus eksperimenti vivi eterne, se niaj malamikoj tion rifuzus, aŭ se oni sendus ilin en alian lokon, kie ni ne povus renkontiĝi.

La fundamenta absurdeco pri estonta vivo estas, ke ekzistos ia personeco en postmorta vivo. La patrino, kiu sopiras al sia infaneto, renkontos ĝin post tridek jaroj, kiam ĝi estos kreskinta ĝis nerekoneblo. Gepatroj estos reunuigataj kun siaj familianoj en mondo, kie ne estas seksoj kaj ne estas familioj. La "animo" ekzistos sen korpo; funkcioj estos sen organoj; viroj kaj virinoj, kiuj kutime rekonas unu la alian pro iu formo, malsimila al ĉiuj aliaj formoj, estos rekoneblaj, kiam formo ne ekzistos. En mondo, kie ĉio estas renversita, kiu povas diri, kio okazos? Kie prudento estas senpova, ekzistas ebleco por ĉiaj absurdaĵoj. Sed kial oni turmentiĝu pri estonta vivo, pri kio nenio estas konata? Ni neniam aŭdis pri homoj, eĉ kristanoj, plorantaj pro tio, ke ili ne sciis, kion iliaj animoj faris, antaŭ ol ili naskiĝis. Krome, se ni vere posedas animon senmortan, ni ne povos ne vivi denove, sendepende de tio ĉu ni ŝatus tion aŭ ne. Plie, ĉu morto ne estas perfekta ripozo? La dormo en morto, tiom kiom ni scias, ne estas maltrankviligata de sonĝoj. Do, kial timi? La liberpensulo estos egala kun la kristano eĉ en la morto.

Ĉapman Kohen.

---

## Religia reformado — religia ruzo en Svedio

La religiuloj — precipe iliaj gvidantoj, pastroj kaj predikistoj — estas ĉiam treege ruzaj.

En Svedio ili sukcesis, eble pli ol en multaj aliaj landoj, sklavigi la popolon sub la religiaj dogmoj kaj tradicioj. Ĉar la plej granda partio — la socialdemokrata, ankaŭ iĝis plitolerema rilate al la eklezio, kaj la religiaj sektoj ankaŭ tion multe helpis, la religiuloj kaj precipe la pastraro de la protestanta ŝtateklezio komprenis la gravecon ricevi influon en soc. dem. partio kaj sukcesis. Multe da pastroj apartenas al soc. dem. partio kaj eĉ tiu partio havas la plej multajn pastrojn kiel reprezentantojn — por la laboristaro — en la parlamento.

Tamen oni devas konfesi, ke la laboristoj ne multe kredas al la religiuloj; al la protestanta eklezio ili ne havas grandan fidon, ne multaj iras al la ŝtataj preĝejoj. Okazas, ke pastroj parolas al 25—50 personoj en grandaj preĝejoj. Tamen la diversaj sektoj — pentekostaj amikoj, Savarmeo, la baptistoj ktp. — logas la publikon per pli gajaj programoj. Ne ĉar la publiko tute konsentas, sed pro scivolemo, pro sensacio ktp. Certe la laboristaro kaj kamparanaro donas tro multe da intereso al la religiaj movadoj, kaj eĉ tro multe subordiĝas al iliaj dogmoj, eĉ se oni devas konfesi, ke ilia kredo al la religio ne estas tro forta. La eklezio kaj la sektoj tamen multe gvidas ilian pensmanieron, multe malhelpas al la klasbatalo.

Sed sciante, ke la laborista movado tamen estas granda kaj ke granda parto de la laboristoj — eĉ se ili ne estas liberpensuloj — tamen ignoras la religion, la pastroj multe diskutas pri eblo aktivigi la intereson al la eklezio kaj al la religio ĝenerale.

Por trompi la laboristojn kaj malriĉulojn, kiuj ne estas interesataj pri religiaj spektakloj kaj kiuj pli kaj pli forturnas sin de la religio, estas fondita "La religia reform-asocio", gvidata de profesoro Emanuel Linderholm. Inter la fondintoj estas 30 pastroj kaj kelkaj religiinstruistoj. Ankaŭ soc. dem. protestantaj pastroj, ekzemple, ĉefpastro Karl Sandegard, kiu diras, ke pli profunda spirita liberiĝo estas necesa kaj ke la religio devas krei vivan socian respondecon. — Eble li pensas pri tio, ke dum la lasta tempo kelkaj svedaj pastroj estis aktivaj en gravaj ekonomiaj spekuladoj. Unu ĉefpastro estas en malliberejo, ĉar li dum multaj jaroj ŝtelis la monon almozpetitan en sia preĝejo kaj ankaŭ forigis 30 mil svedajn kronojn el la kaso de la komunumo, kie li estis fama persono. Unu ĉefpastro en Göteborg estis prezidanto en banko, kiu ruiniĝis per spekulacioj, kaj tial la ŝparemuloj inter la laboristoj nun riskas ne ricevi siajn monojn deponitajn ĉe la banko.

La estro de la religia reform-asocio diras, ke oni volas havi membrojn el ĉiuj politikaj partioj: "Ni volas havi membrojn el inter la aristokrataro same kiel el la vicoj de laboristoj kaj ni volas labori je vasta demokrata fronto." Por interesi la amasojn por la religio, oni volas esti toleremaj kontraŭ diversaj religiaj opinioj. Do, ĉiu povas havi sian specialan dion. La ĉefafero estas, ke la religio regas ideologie. La profesoro konstatas, ke oni, por aktualigi la religion, devas havi "pli liberajn religiajn konturojn" kaj li daŭrigas: "Estas kultura malriĉeco, ke ni ĝis nun ne havis religian asocion kun pli liberaj formoj. Nia spirita vivo tamen estas tre riĉa kaj la nun vekiĝantaj religiaj interesoj estas tiel fortaj ankaŭ inter la maldekstruloj — svedaj socialdemokratoj — ke ni devas uzi la tempon al kolektiva kunlaboro."

Oni klarigas, ke estas "multaj homoj, kiuj ne povas simpatii kun la jam ekzistantaj religiaj sektoj, kiuj havas malnovajn tradiciajn formojn" kaj tial estas necese krei "pli modernan religian koncepton", kiu povas allogi la popolon al la religio.

La religiuloj estas agemaj. Ili estas ruzaj. Ili serĉas novajn formojn, aliformigas la religion por per ĝi havi influon. Ĉiam ili tamen servas al la eks-